

& La ĝojoj de ekskurso:

< Rekante 25 el 49 batoj por strofo, entute 294 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:49> (

i;do /mimi redo Ti So;Ti rere doTi La La;do mimi redo Ti So;Ti rere doTi La La;do
mimi redo Ti So;Ti rere doTi La La

(#Rekantaĵe: mi domi somi re re;Ti do Lado mido TiLa Ti mi; mi domi somi re re;Ti
do Lado mido TiLa Ti mi;Ti do Ti

)×6)+

(&Strofoj:

'1 /Sinjoro Piro iris ; Dimanĉon
frumatene ; Kun Esperanta Grupo ;
Ekskursi esperplene, ; Ne havis tempon
manĝi, ; Li lupe malsatiĝis,

(×:; **Sed tamen nia Piro ; Bonege
ekskurse amuziĝis! ; Pri tiu tago
poste ; neniam li kun amikoj ridis ;
Ekskurson.**)

'2 Post longa atendado ; La vagonar'
alvenis ; En kiu pugnobate ; Starlokojn
oni prenis; Ŝvitige premegita ; Li
preskaŭ sufokiĝis,

'3 En vilaĝeton fine ; La Grupo
alveturis, ; Tuj la malsataj homoj ; Al la
gastejo kuris, ; Ho ve, eĉ panpeceto ;
En ĝi ne plu troviĝis,

'4 La ekskursanoj poste ; Tra la kampar'
promenis, ; Subite fulmotondro ; Per
akvo ilin benis, ; Senŝirme sub pluvego
; Nun ĉiuj akvumiĝis,

'5 Ĉar Piro dum diskuto ; Pri "io"
kontraŭdiris, ; Tuj oni argumente ;
Krataton lian ŝiris, ; Kaj el diskut'
rezultis, ; Ke... lia naz' sangiĝis,

'6 Vespere, kiam Piro ; Al sia hejmo
venis, ; Tuj lia edzinaĉo ; La balailon
prenis, ; Frakasis lian dorson ; Ĝis li
senkonsciiĝis,